



# Komencanto

## Kiel tio komenciĝis

Rakontas Geza Kurucz,  
redaktoro de "Juna amiko"

## Geza Kurucz

Ĉu eternaabelo aŭ ekzistas  
eliro  
La gesta kalkulo

## Verkoj de niaj legantoj

Printempa poezio  
Koloroj kaj triloj  
Hiacinto kaj papaveto  
La Infana Tago  
Verda krokodilo  
Eseo "La sonĝo de Makaro"

## Gramatiko serioze kaj ŝerce

... ni studu iom da Esperanto  
Gramatikaj vortludoj el "Juna  
amiko"

## Humuraj paĝoj

Kiel "fumi" en karbona  
dioksido?  
Ŝercoj kaj anekdotoj  
el lerneja vivo

## La praktiko


Flugiloj de malfacila vento  
Samarkando en ĉiuj  
kontinentoj

## Konkurso

"Enigmoj 2007"

## Korespondu!

Korespondpetoj



Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

*Saluton, Printempo!*

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

2007

marto-aprilo

2 (64)

## Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,  
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910  
- Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson  
St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,  
Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia  
(DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craighill Road, Carlisle, ML8 4QT
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorka 1, CZ-696 62 Strážnice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,  
Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,  
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Ermits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.
- Finnlando** Paivi Saarineu, Esperanto-Asocio de Finnlando  
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceri-  
saie, 75004, Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Strasse,  
9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada  
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TE-  
HRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Mi-  
lano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Višnja Branković  
Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,  
Dublin 6W
- Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,  
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-  
08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa  
11300, Havano
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k.  
167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,  
N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,  
Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-  
137, PL-01-865 Warszawa
- Portugallio** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,  
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8,  
SE-242 35, Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH —  
4224 Nenzlingen
- Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El  
Cerrito, California 94530, U.S.A.

### Karaj legantoj!

En tiu ĉi numero ni kun plezuro prezentas al vi nian kole-  
gon, fondinton kaj redaktoron de mondfama E-revuo "Juna  
amiko" Geza Kurucz.

"Juna amiko" antaŭnelonge festis sian 25-jaran jubileon kaj  
pasintjare la redaktoro mem festis 50-jaran jubileon de sia esper-  
antistiĝo. Kiel Geza Kurucz konatiĝis kun Esperanto kaj dediĉis  
al ĝi la tutan vivon legu ĉe la najbara paĝo. Sur du sekvaj paĝoj  
vi povas konatiĝi kun verkoj de Geza Kurucz, en kiuj li montras  
sin kiel serioza esploristo de lingvaj problemoj kaj aliflanke bon-  
humora persono, kiu kolektas kaj verkas por sia revuo diversĝen-  
rajn utilajn amuzojn, instruhelpajn vortludojn ktp.

De belaj versajetoj pri printempo de N. Neĉajev ĉi-foje ko-  
menciĝas rubriko "Verkoj de niaj legantoj". Printempe nin ĉiujn  
ĝojigas renoviganta naturo, gaje kantantaj birdoj, belaj floroj, fre-  
ŝaj aromoj de aero. Aperas krea inspiro, poezia humoro. Ĉion  
tion respegulas kolektitaj en la rubriko materialoj, kiel "Kanto pri  
sakuro" de I.Micuko kaj tradukita eseo de R.Pyhala pri kanarioj  
"Koloroj kaj triloj". Printempan humoron portas ankaŭ du origi-  
nalaj verkoj de I.Micuko "Hiacinto kaj papaveto" kaj "La Infana  
Tago", en kiuj estas priskribitaj interesaj japanaj tradicioj.

Per originala kaj tre amuza rakonto "Verda krokodilo" de-  
butas en nia revuo D. McCarney, kiu verkis tiun ĉi tekston kiel  
taskon en la perfektiga kurso de B.Kolker "Vojaĝo en Esperanto-  
lando". Jam pli kaj pli da lernantoj de B.Kolker sendas al ni siajn  
krajn provojn, ĉar vere la celoj de "Vojaĝo..." kaj de "Komen-  
canto" koincidas – ambaŭ kuraĝigas samideanojn verki en nia  
lingvo. Ĉe la 9-a paĝo vi denove vidos nomon de Itabaŝi Micuko  
kun ŝiaj impresoj pri la rakonto de V.Korolenko "La sonĝo de  
Makaro".

Apud la jam kutimaj gramatikaj lecionoj de J-L. Tortel  
troviĝas gramatikaj vortludoj el "Juna amiko", faritaj de Geza  
Kurucz mem.

Ankoraŭ unu debuto en nia revuo – ĉe la humuraj paĝoj  
S.Manzurov el Rusio prezentas amuzan neelpensitan historion el  
siaj lernejaraj jaroj. Lernejan temon respegulas ankaŭ anekdotoj.  
kiujn vi trovos ĉe la kutima 13-a paĝo.

"Flugiloj de malfacila vento" estas nova internacia projekto  
por E-instruistoj, pri ĝi skribas A.Osincev el Rusio. "Samar-  
kando en ĉiuj kontinentoj" estas la vica iniciato de "Internacia  
Muzeo de paco kaj solidaro" en Samarkando, kiun direktoras  
A.Ionesov. monde konata esperantisto kaj bona amiko de nia re-  
vuo. "Enigmoj-2007" kaj korespondanoncojn vi trovos sur kuti-  
maj lokoj.

Agrablan legadon!

## Komencanto

2007 numero 2 // (64) regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

kunredaktas Raja Kudrjavceva

adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)

abontarifo por 2007:

internacia tarifo: 18 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 15 eŭroj;

aerpoŝta aldono 2 eŭroj

konto ĉe UEA: [vkud-a](#)

rusia tarifo: 200 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

*Vaste konata esperantisto el Hungario, kiu jam 50 jarojn sindediĉe laboras por nia lingvo, aktiva membro de Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj, fondinto kaj redaktoro de monde konata revuo*

*Juna Amiko*

## ... nur celkonsciaj idealistoj povas kaj devas antaŭenpuŝi la homaron



**A**ntaŭ 50 jaroj, nur kelkajn semajnojn antaŭ la fama oktobra revolucio de la hungaroj en 1956, mi konatiĝis kun Esperanto. Tiu-tempe mi laboris en Budapeŝta teatro „Madaĉ” (:Madaĉ) kiel kulisisto. En liberaj antaŭtagmezaj horoj mi ofte vizitis la ĉefbibliotekon, kaj en iu somerfina tago pruntis, kvazaŭ hazarde, Esperanto-lernolibron. Legante ĝin mi estis pli kaj pli ravita pro la simpleco kaj logikeco de la lingvo kaj – malgraŭ tio, ke mi ĝis tiam interesiĝis nur pri natur-sciencoj kaj havis nur malsukcesojn en lingvolernado – decidis lerni la lingvon, sciante nenion pri tio, ĉu ekzistas ankoraŭ esperantistoj (la libro, kiun mi pruntis el la biblioteko, aperis fine de la 19a jarcento). Dank’ al Esperanto, kiun mi alproprigis sufiĉe bone en duonjaro, mi fariĝis poste lingvoinstruisto kaj ĝuanto de lingvistiko.

Sed printempe de 1957 mi ankoraŭ sciis nenion pri la tiu-

tempa Esperanto-movado. Mi decidis do skribi leteron al la redakcio de la Hungara Radio kaj petis ilin sciigi min pri hungaraj esperantistoj, se ili havas informon pri tiuj „mistikaj” silentemaj estuloj. La redakcio de la Radio estis tre afabla. Post unu semajno alvenis letero kun ĝojiga enhavo. Laŭ ilia informo esperantistoj ĉiu-semajne kunvenas en Budapeŝto (ili donis precizan adreson). Tiu-tempe mi jam loĝis en Kecskemét (86 km de Budapeŝto) kaj post kelkaj tagoj mi prenis biciklon kaj ekiris por trovi la unuan vivantan esperantiston. Kaj ĉu vi scias, kiu estis tiu? Julio Baghy, nia „paĉjo”. Li afable akceptis min, donis la necesajn informojn kaj adreson de unu aktiva Budapeŝtano, kiu poste akceptis min hejme kun granda ĝojo kaj helpemo. De li mi ricevis vortaron, kelkajn gazetojn kaj li malkaŝis, ke Radio Romo regule dissendas Esperantan programon. Tio donis al mi perspektivon kaj ligis min al la mondo. Mi ekkorespondis kun rusino, estono, germano kaj ĝuis, ke malfermiĝis la mondo antaŭ mi.

Tamen, pli ol la struktura klareco kaptis mian koron la demokратиismo, kiu estas nedisigeb-la esenca parto de la lingvo. Esperanto estas por mi multe pli ol unu el la ekzistantaj lingvoj. Antaŭ ĉio ĝi estas ideo nobla, kiu dum marĉoplana jarcento ne malpuriĝis, ne kompromitiĝis. Tiu ĉi pont-lingvo interligas ne lingvajn surdmutulojn, sed antaŭ ĉio kaj ĉefe homajn korojn. Mia opinie vera esperantisto distingiĝas ne nur per parolkapablo de la Internacia

Lingvo, sed ankaŭ per malfermiteco al homaj suferoj kaj maljustaĵoj. Sindona adepto de la neŭtrala komunikilo deziras aktive – ne per buŝo, sed per agoj – fari ion utilan por siaj homfratoj. Mi esperas, ke multaj el vi pro tio laboras por Esperanto.

Sed ni revenu al la komenco. Fininte la universitatajn studojn, en 1962 mi ekinstruis en mezgrada lernejo, kaj baldaŭ mi komencis gvidi Esperanto-kursojn kaj tie kaj en la urba kulturdomo. Post unu jardeko, t.e. en la jaro 1972 mi iniciatis facillingvan E-periodaĵon por lernejoj, ĉar ĝis tiam malaperis la iamaj provoj („La Juna Vivo”, „Juna Esperantisto”, „Pioniro”, „La Praktiko”) kaj mi multe sentis la mankon de celtaŭga legomaterialo. Helpe de ILEI kaj HEA aperis la provnumero de „Juna Amiko” jam en novembro de 1972. De tiu tempo ĝis hodiaŭ plimalpli regule ni eliras tri aŭ kvar fojojn jare, komence en amplekso de 24 paĝoj (de formato A/5), kaj ekde la jaro 2005 kun plenkoloraj kovriloj sur 52 paĝoj. Nuntempe ni havas kunlaborantojn el 19 landoj de ĉiuj kvin kontinentoj. La nombron de la kontribuantoj estus tre malfacile vicigi, praktike en la redaktado partoprenis/as la tuta mondo. Nu, pri tio mi estas fiera. Mi fidas la sobrecon de la homaro kaj kredas, ke post longa, persista agado estos atingebla ankaŭ nia celo. Ne forgesu la historian sperton: nur celkonsciaj idealistoj povas kaj devas antaŭenpuŝi la homaron.

Ĉi tie ni prezentas al vi diversĝenrajn verkojn de **Géza Kurucz**

**M**ultlingveco malhelpas liberajn interhomajn kontaktojn...

... **La gepatra lingvo estas la plej grava portanto de la vivmaniero kaj kulturo de ĉiu popolo.** Se lingvo malaperas, en relative mallonga tempo forgesiĝas la historio kaj kulturo de la koncerna etno. Evidente ĉiu popolo volas konservi sian lingvon, kies perdo egalas ja la pereon de la etno. ... Sciu, ke nuntempe pli ofte ol antaŭe malaperas malgrandaj lingvoj, kiuj konservis spertojn kaj memorojn de forpasintaj jarmiloj. Kaj ni, eksteruloj apenaŭ atentis pri ili, ja tiom da malnovaĵoj perdiĝas ĉirkaŭ ni, ni opinias: tio estas evidenta sekvo de la progreso.

Mi petas vin, kara leganto, ne fariĝi tiel supermoderna. bonvolu iom mediti pri tio, ĉu ĉio evoluas en ĝusta direkto? ...

... Unu konstato estas certa: la nuntempa komunikado ne similas eĉ tiun de la 19a jarcento, por ne menciigi la pli fruajn epokojn, kiam la individuo vivis en preskaŭ plena izoleco..

... Kiel manifestiĝas la revolucia ŝanĝo en la komunikado, lingvouzo? La komunikiloj fariĝis multspecaj, rapidaj kaj preskaŭ kapablaj pensi. Sed kiel aliformiĝis la lingva komunikado? Tie okazis preskaŭ nenio. Ĉiam ankoraŭ dominas la sama principo, kiu regis antaŭ jarmiloj: **por transnacia komunikado servas la lingvo de la ekonomia kaj politika grandpotenco aktuale plej forta...** ... Pere de internacia komunikado **ensepezas** miliardojn ĝuste tiuj landoj, kiuj eĉ sen tio estas relative riĉaj kaj la malpli sukcesaj **elspezas** miliardojn el siaj malriĉaj buĝetoj por esti kapablaj almenaŭ hontinde balbuti trans la landlimoj. Kia egaleco estas tio? ...

... Kia lingva egaleco estas tio, kiam iuj popolanoj devas lerni du-tri fremdajn lingvojn, dum aliaj – kiel ekzemple Britio – ĉesigas la devigan instruadon de fremdaj lingvoj, ĉar por tio nuntempe granda bezono ne montriĝas, ĉi-terene oni povas do ŝpari. Kaj praktike ili pravas. En la nuna sistemo ili facile prosperas, dum aliaj suferegas pro ĝi.

## Ĉu eterna Babelo aŭ ekzistas eliro?

Kio estas antidemokratia en tiu ĉi interkomunikado? Tio, ke estas elektitaj unu-du naciaj lingvoj, sed ne pro lingvaj va leroj ili estas levitaj super la ceterajn, sekve ili estas altruditaj al alilingvaj nacioj. Altrudo mi konsideras ankaŭ, kiam iu memvole, kun ĝojo elektas iun lingvon, ĉar li konscias, ke sole tiel li povos plenumi la postulojn, kaj ke la elektita lingvo grave faciligas lian karieron.



Kial tiu ĉi vojo estas maljusta? Krom la ekonomia malegaleco ĝi estas antidemokratia ankaŭ pro tio, ke la lingvo – estante portanto de la koncerna etna kulturo – plialtigas la rangon de la nacio, ĉar lingvo ne estas lernebla sen alproprigo de ties nacia kulturo. Kio ne estas konata, tio ne estas aprezata; kio estas konata, tio estas valora kaj utila. **La instruado de fremdaj lingvoj grave kontribuas al nereala, iom falsa prezento de la tuthomara kulturo.**

Kie troveblas do la solvo? Ĉu ekzistas, entute, demokratia solvo?

Feliĉe la homaro ĉiam rigardas antaŭen... De antaŭ jarcentoj ĝi serĉas eliron. Relative rapide ĉiu pensulo unuanime venis al konkludo, ke neniun nacia lingvo taŭgas por transnacia komunikado justa, la elektita lingvo akiras ja grandegan avantaĝon nejustan. Kaj, se taŭga lingvo ne ekzistas, necesas ĝin krei, diris ili ĉiuj...

...Ĝenerale ĉiu radikala nova ideo estas akceptata, kvazaŭ tradicie, kun forta kontraŭstaro. Neŭtrala transnacia lingvo ne estas escepto.

Multaj – kaj troviĝas inter ili alte respektataj personoj – deklaris, ke lingvo ne estas artefarebla... Sciu, cetere, ke ĉiu lingvo, ŝajne spontane evoluanta, estas artefarita, modifata, korektata en certaj epokoj kun celkonscia intenco.

Kiel ĉiam, inter eksperimentoj aperas kreaĵo, prezentanta plej taŭgan solvon, kaj krom tio, ni jam posedas lingvon, kiu dum la pasintaj 119 jaroj fariĝis vivanta lingvo de komunumo, konsistanta el multaj diversaj nacioj. Ĉiu aŭdis pri ĝi, **tiu ĉi lingvo estas Esperanto.** Multaj prononcas ĝian nomon kun ironio, malrespekto. Aŭskultante tian opinion, mi ĉiam scias, ke la opinianto eĉ unu minuton ne okupiĝis pri ĝi. Ĉar persono, kiu faris tion, ĉiam eldiras ĉi-vorton kun respekto. Pro kio do? Tial, ke tiu ĉi lingvo estas fakte admirata kreaĵo. Tiomgrade ĝi estas artefarita, ke ĝi fariĝis ne artefarita. Ĝia vortaro konsistas el vortoj grandparte jam internaciigitaj de vivantaj lingvoj. Sed lingvo estas pli ol vortaro, ĝi estas ankaŭ gramatiko. Ĉu iu povus imagi, ke ĝia gramatiko, ne havanta esceptojn, bezonas nur kvar-kvin paĝojn? ...

...Nuntempe rekte en Esperanto kreas kelkaj elstaraj verkistoj kaj poetoj, la esperantistoj ĉiu-jare havas internacian kongreson (la venonta 92a okazos en Japanio), ili havas multajn aranĝojn, diversspecajn utilajn revuojn. En interreto, se iu tajpas la vorton „esperanto”, li povas tuj konstati, ke ĉio supre dirita ne estas senhava babilajo. Pluraj verkistoj, sciencistoj parolis kaj parolas pri ĝi kun sincera admiro.

Kial oni ne uzas ĝin internacie multe pli vaste? Malgraŭ ke Unesko apogis ĝin jam en la jaro 1954 kaj en 1985 konfirmis sian pozitivan opinion, la lingvon ĉirkaŭas relative granda silento. Kial? Parte pro tio, ke la Esperanto-movado ne disponas pri necesaj monrimedoj, parte – kaj mia opinio ĉefe – pro tio, ke ĝi estas revolucia solvo, kiu kontraŭiras la tradicion de jarmiloj, kaj la politikon de la grandpotencoj...

# La gesta kalkulo

Geza Kurucz Juna amiko 2-2002

Ni, esperantistoj, konscias, ke ekzistas en la mondo granda aro da diversaj lingvoj... Sed ĉu vi pensis pri tio, ke krom la parola kaj skriba lingvoj, oni uzas ankaŭ gestan lingvon, kiu je la unua rigardo, ŝajnas universala. Mi aludas pri tio, ke alilingvanoj ofte sukcesas komprenigi sin per gestoj.

Malgraŭ tio ne unu-foje ankaŭ la gesta lingvo kaŭzas konfuzon: pensu, ekzemple, pri jesado kaj neado per kapmovoj en Bulgario kaj Japanio.

Nun dank'al la helpo de pluraj dekoj da esperantistoj el diversaj landoj, mi prezentas al vi, kiel oni kalkulas/nombras per fingroj en la mondo. Atentu ilin kaj, se mankas via kalkulmaniero, informu nin, mi petas.



## Kalkulmaniero A

- 1 – malfermita dikfingro,
- 2 – kiel 1 + malfermita montra fingro
- 3 – kiel 2 + malfermita meza fingro
- 4 – kiel 3 + malfermita ringa fingro
- 5 – ĉiuj fingroj estas malfermitaj

*Tiel nombras britoj, germanoj, hungaroj, togolandanoj, israelanoj*



## Kalkulmaniero D

- 1 – malfermita etfingro
- 2 – kiel 1 + malfermita ringa fingro
- 3 – kiel 2 + malfermita meza fingro
- 4 – kiel 3 + malfermita montra fingro
- 5 – ĉiuj fingroj estas malfermita

*Tiel oni nombras en Salvadoro, ekzemple.*



## Kalkulmaniero B

- 1 - fermita etfingro
- 2 kiel 1 + fermita ringa fingro
- 3 kiel 2 + fermita meza fingro
- 4 kiel 3 + fermita montra fingro
- 5 - ĉiuj fingroj estas fermitaj

*Tiel oni nombras, ekzemple, en Azerbajĝano, Rusio, Salvadoro.*



## Kalkulmaniero E

- 1 - malfermita dikfingro
- 2 kiel 1 + malfermita montra fingro
- 3 kiel 2 + malfermita meza fingro
- 4 - malfermitaj montra, meza, ringa kaj etfingroj, sed la dikfingro estas fermita
- 5 - ĉiuj fingroj estas malfermitaj

*Tiel nombras slovenoj, ekzemple.*



## Kalkulmaniero C

- 1 – malfermita montra fingro
- 2 – kiel 1 + malfermita meza fingro
- 3 kiel 2 + malfermita ringa fingro
- 4 kiel 3 + malfermita etfingro
- 5 – kiel 4 + malfermita dikfingro

*Tiel montras la nombrojn bulgarioj, honduranoj, irlandanoj, kolombianoj.*



## Kalkulmaniero Ĉ

- 1 - fermita dikfingro
- 2 kiel 1 + fermita montra fingro
- 3 - kiel 2 - fermita meza fingro
- 4 - kiel 3 + fermita ringa fingro
- 5 kiel 4 + fermita etfingro

*Tiel oni nombras en Koreio, ekzemple.*



## Kalkulmaniero F

Ĉiuj fingroj estas malfermitaj kaj la montra fingro de la alia mano sinsekve saltas de fingro al fingro komencante de la etfingro.

De 6 ĝis 10 oni kalkulas per la alia mano en sinsekvo de 1 ĝis 5.

*Tiel oni nombras en Kubo, ekzemple.*

*Kolektitajn en la rubriko verkojn unuigas temo de printempo, bona poezia aŭ ŝercema humoro.*

Esperantigis finnan tekston de *Aŭra Koivisto*  
**Raita Pyhälä** [Lestijärvi, Finnlando]

## Koloroj kaj triloj

**Nikolaj Neĉajev** [Irkutsk, Rusio]

### Printempa hajko

En ĉambro gutas.  
Tra tegmento truita  
Printempo fluas.

### Rakontu pri primavero

Pri primavero  
Per manifest',  
Per rima vero,  
Per versa fest'.  
Per poezio,  
Per versajet',  
Per iluzio,  
Far de poet'.



**Itabaŝi Micuko** [Jokohamo, Japanio]

*Nun nia urbo Jokohamo estas kovrita per florado de sakuro. Mi volas montri tion al miaj eksterlandaj geamikoj kaj metis la fotojn en mian blogon. Bonvolu vidi! <http://blog.goo.ne.jp/lingponto/> Lastatempe Radio Polonia kelkfoje elsendis kanton pri Sakuro. Mi proponas tradukon de tiu kanto, kiun esperantigis **Ter Iŝiguro**.*

### Kanto pri sakuro

Ĉeriz-floroj (sakura, sakura)  
Ĉeriz-flor', ĉeriz-flor'!  
Sub printempa ĉiel'  
Regas dolĉa duonhel'.  
Ĉu nebul' aŭ nub' aŭ fum'??  
Nur inundas la parfum'.  
Ĉiuj ni iru por ĝui ja kore.

Kanario (*Serinus canaria*) estas unu el la plej konataj kaĝobirdoj. Origine ĝi vivas en la Kanariaj Insuloj, Acoroj kaj Madejro, de kie hispanaj monaĥoj kunportis ĝin al la Eŭropa kontinento jam en la 16a jarcento.


Kanarioj estis uzataj en minejoj, kvankam *pioĉi la fragila* birdo ne povis. Ĝia tasko estis averti la ministojn, se aperis venenaj gasoj en la tuneloj. Kiam la birdoj komencis svenadi, la ministoj rimarkis la danĝeron sufiĉe frue. La birdojn ili poste rekonsciigis per oksigeno kunportata.

Ne malfacilas bredi kanariojn. Dum la jarcenta bredado kreigis pluraj specoj kun diversaj koloroj. Trov-eblas kanariflavaj, rozkoloraj kaj skvamo-striaj kanarioj. La korpo de la birdo povas esti pilke rondeta aŭ ovale longeta. En la plumaro povas troviĝi strangaj bukloj kaj kufoj.

Kiel kantisto la kanario estas fama. La bredistoj favoris la plej bele trilantajn birdojn, tial estiĝis specoj, kiuj kantas eĉ pli lerte ol la kutimaj.

La karaktero de la kanario estas vigla. Kiam la birdo jam al kutimiĝis al via hejmo, lasu ĝin elkaŝi kaj ĉirkaŭflugadi. Ne metu du virbirdojn kune, ĉar ili facile ekbatalas. La kaĝo devas mezuri minimume 70 x 50 cm kaj alti 60 cm. En la kaĝo troviĝu sufiĉe da stangetoj, sur kiuj la birdoj povas sidi, diversdikaj naturaj branĉoj bone taŭgas. Ĉiam troviĝu tie ankaŭ bankuvo, ĉar la kanario tre ŝatas baniĝi.

En la devenlokoj daŭre troveblas originaj kanarioj en la naturo. Se vi tie vojaĝos, havu viajn okulojn kaj orelojn malfermaj. La sovaĝan birdon oni ĝenerale renkontas en montaro, hortoj kaj ĝardenoj. Ĝiaj koloroj estas pli modestaj ol tiuj de la breditaj kanarioj. Vira sovaĝa kanario kutimas suprenflugi en la ĉielon, fervore kantante, kaj poste malrapide reveni kaj sidiĝi sur la pinton de iu arbo.



**Zajceva Katja** [Strejevoj, Rusio]

*Jen du eseoj de nia japana legantino Itabaŝi Micuko. Unu portas senduban printempan humoron kaj la dua rakontas pri tradicia printempa japana festo.*

## La Infana Tago

### Hiacinto kaj papaveto

En nia lando okazas scienca lernado de la unua lernojaro. En la unua lernojaro lernantoj plantas konvolvulon en sia vazo, alportas ĝin en someraj ferioj, kaj observante ĝin, desegnas la kreskoprocedon. En la dua lernojaro lernantoj akvokultivas hiacinton. Povas esti, ke la floroj kiel materialoj diferenciĝas en regionoj.

Kiam aĝaj filoj faris tion, ni loĝis en apartamento. Pro tio mi ne povis daŭre kreskigi ilin.

Antaŭ preskaŭ 30 jaroj mia juna filo portis sian hiacinton. Feliĉe ni havis malgrandan korton kaj plantis ĝin antaŭ enirejo de la domo. De tiam ĝi kreskis tie kaj ĉiujare havis belan floraron.

Lastjare ni transloĝigis en nunan domon. Tiam mi elfosis ĝin. La bulo havis multe da idoj. Mi erigis ilin kaj plantis ankaŭ antaŭ enirejo.

Lastatempe ili ĝermis kaj nun floras pli ol dudeko da malgrandaj floroj.

Kiam ni transloĝigis, mi trovis en la korto tretitajn papavetojn. Ili aspektis tre mizeraj, kvazaŭ ŝiritaj papiliajflugiloj. Sed nun papavetoj ĝermis kaj vikle kreskadas. Ili kovras tie kaj ĉi tie la terspacon, ankaŭ malgrandajn hiacintojn. Ĉu mi devas sarki ilin? Mi ne sciis, ke tiuj amindaj floroj estas tiom fortaj. Nia domo ĉirkaŭ havas nur malgrandan terspacon. Baldaŭ ili tute okupos ĝin. Mi momente ĉagrenis sed poste pensis, ke mi povos forpreni ilin florintajn. Iom da tempo mi povos ĝui belan printempon.

En nia lando estas 14 festotagoj. Unu el ili estas la Infana Tago en la 5a de majo. Antaŭ la dua mondomilito ĝi estis festo nur por knaboj, sed nun por ĉiuj infanoj. Malgraŭ tio, la moro ankoraŭ daŭriĝas.

Tradicie, kiam naskiĝas knabo, la parencoj donacas grandan karpoforman flagorubandon aŭ ornamitan kaskedon al li. Kaj la familio oranamas la kaskedon en la domo kaj hisas flagorubandojn alten ekster la domo per longa stango je kelkaj diurnoj antaŭ la Infana Tago. Tial tiutempe ruĝaj, nigraj, bluaj kaj flavaj karpoj naĝas en firmamento tra la tuta lando.

Vi pensas, kial la flagorubando havas karpan formon. Pratempuloj kredis, ke la karmo supren naĝas eĉ kontraŭ akvofalo. Pro tio ili vidis ĝin progresema kaj brava. Gepatroj deziris, ke iliaj filoj havu tiujn karakterecojn kaj petis tion de dio kaj esprimis tiun deziron per la flago.

Sed post kresko de knaboj la flagorubandoj jam ne estas bezonataj. Ili fariĝas eĉ rubaĵoj. Iam kaj iuj kolektis ilin kaj hisis en parkoj aŭ super trans riveroj. Baldaŭ la afero furoris en la tuta lando. Se vi vizitos nian landon dum la certa tempo, vi povos vidi tiujn pejzaĝojn.

Se vi volas vidi la fotojn, bonvolu viziti jenan blogeton: <http://blog.goo.ne.jp/lignponto/e>



*Kononova*

*Tiu ĉi amuza, originale verkita fablo estas debuto de Debra McCarney. Ŝi estas lernantino de la kurso "Vojaĝo en Esperanto-lando" de Boris Kolker. Ŝi verkis la rakonteton por unu el lecionoj de la kurso. Ni ŝatus, ke tiu ekzemplo kuraĝigu multajn por perfektigi kaj provi ekverki.*

**Debra McCarney** [Okcident-Aŭstralio]

## Verda krokodilo

La junaj krokodiloj estis tre ekscitaj. Ekde sia infaneco ili envie rigardis la plenkreskulojn kaj volis esti kiel ili. Sed ne kiel la ordinara plenkreskulaj krokodiloj! Tute ne! Ili ne admiris la brunan aŭ grizan haŭtokoloron de la plejmulto. Ili admiris la krokodilojn kiuj havas brilan verdan haŭton. Kaj hodiaŭ estis la unua tago de la somerkursaro por igi Verda Krokodilo. La krokodilidoj komencis lerni tiun misteran lingvon, kiun nur la Verdaj Krokodiloj flue parolis; tiu lingvo per kiu ili facile komunikigis amikece kun multaj aliaj sovaĝaj bestoj.

Solomin Dmitrij [Ivdel, Rusio]



Kaj iom post iom, horon post horo, tagon post tago, preskaŭ nerimarkite, la haŭtoj de la krokodilidoj iĝis verdaj.

Post la somerkursaro la krokodilidoj fiere montris siajn verdkolorajn haŭtojn al siaj neimpresitaj amikoj kaj ne komprenis, kial la aliaj tiom ridis pri ili. Sed tio ne tre konfuzis Verdajn Krokodilojn. Ili ĝuis praktiki sian novan lingvon per konversacioj kun aliaj bestoj, kaj ili entuziasme babilis inter si.

Krokjo estis unu el la plej entuziasmaj. Lia haŭto brilis verde kaj li ĉeestis ĉiun feston, ĉiun kunvenon de la Verdaj Krokodiloj. La aliaj daŭre studis kaj legis kaj originalajn librojn kaj tradukitajn el aliaj bestlingvoj librojn, sed Krokjo fanfaronis ke lia lingvoscio estas jam sufiĉa por iom komunikigi kaj li ne havis tempon legi aŭ studi. Li salutis la aliajn, "Bonan tagon", li adiaŭis ilin, "Ĝis revido, samideanoj", sed pli kaj pli li metis vortojn de sia denaska krokodila lingvo en siajn frazojn. La aliaj krokodilidoj ankoraŭ komprenis lin, kompreneble, sed la aliaj bestoj komencis eviti konversacii kun li. Ili ĝuis la fluan paroladon de la aliaj, sed estis tro malfacile komunikigi kun Krokjo.

Tiam li ne tiom ofte ĉeestis la kunvenojn, "Mi estas tro brzuslh", li diris. ('Brzuslh' estas la krokodila vorto por 'okupata'). Pluraj monatoj pasis. Unu vesperon okazis festo por la Verdaj Krokodiloj. La pordo malfermiĝis kaj eniris fremda krokodilo. Li havis brunan haŭton, sed verdajn ungojn.

"Saluton", li diris kaj ridetis iomete hontece.

"Kiel vi fartas?" - li demandis proksimulon, kiu respondis mire: "Bone dankon. Kiel vi nomiĝas?"

La novalvenito ŝajnis konfuzita. "Mia nomo estas Krokjo. Mi ..... ", kaj li ruĝiĝis.

La aliaj rigardis unuj la aliajn. Ilia amiko ne plu estis Verda Krokodilo. Li estis ordinara, brunhaŭta krokodilo denove, sed ankoraŭ kun verdaj ungoj pro siaj kelkaj ankoraŭ memorataj vortoj en la internacia lingvo.



*Jen ankoraŭ unu eseo de Itabaŝi Micuko. La eseo respegulas ŝian impreson de tralegita, kaj ŝi proponis ĝin por publikigi en tiu ĉi rubriko.*

Eseo de **Itabaŝi Micuko**  
[Jokohamo, Japanio]

## Pri rakonto "La Sonĝo de Makaro", verkita de Vladimir Korolenko

Mi ree legis la rakonton "Sonĝo de Makaro". Mi ricevis ĝin de malnova esperantisto, kiam mi helpis lin. Precizan aferon mi ne memoras, sed restas slipo inter paĝoj de la libro, en kiu li skribis japane: "... mi dankas vian helpon, sed mi estis malsana kaj ne povis tuj diri dankon...". La libro estas malnova, eldonita antaŭ la dua mondmilito. Sed la rakonto estas tre bela kaj traduko de s-ino M. Ŝidloskaja estas tre bona.

Mi iom volas mencii pri la enhavo. Ĉefpersono estas Makaro, kiu vivis en Jakutio. Lia vivo estis senespera kaj mizera. Por profiti iom da mono li ofte faris ruzaĵojn, sed pli multfoje li estis mem trompita kaj ekspluatita. Kiam li havis iom da mono, li drinkis malbonan brandon, kiu estis maldensigita per akvo. Legante, oni povas vidi lin ruza kaj mallaborema.

Kiam li mortis, li ekstaris sur genuoj antaŭ Dio por ricevi Lian juĝon, ĉu liaj agoj en la mondo estis bonaj aŭ ne. Tie estis pesilo por pesi tion. Ĝi havis du telerojn: unu por bono, alia - por malbono. Mortinto eĉ provis trompi Dion, sed ekzistis la libro, en kiu estis registritaj ĉiuj liaj faroj en la mondo. Rezulte post la pesado telero de malbono estis tre peza. Kaj Dio verdiktis. Tiam filo de Dio donis al Makaro ŝancon por li ekskuzu sin mem.

Makaro sincere parolis pri sia mizera vivo en la mondo. Unue Dio korelis pro lia plendo, sed poste pli kaj pli kompatis lin. Kaj ...

La rakonto estas amuza. Eĉ kiam la Makaro faris ruzon kaj provis trompi aliajn, la farado estis ne abomeninda, sed komika. Unue la rakonto similis humoraĵon, sed ne estis tia. En la mondo vivas diversaj homoj kaj inter ili estas multaj, kiuj ne havas ŝancon klerigi sin pro denaska malriĉeco.

Ankaŭ multaj "makaroj" estis en Japanio kaj ankoraŭ estas en nuna riĉaspekta nia lando. Leginte la rakonton mi sentis ke mi certe konas "Makaron". Kiam mi estis knabino, mi iris al kamparana domo kun mia patrino por aĉeti rizon. Tiam vilaĝa virino mezuris rizon, kaŝe enmetante dikan fingron en la mezurilon. Mia patrino nenion diris pri tio. Mi pensis, ke ŝi ne rimarkis tion, sed survoje al la hejmo ŝi diris al mi, ke ni pretervidu tion, ĉar kiom da rizeroj ŝi povus profiti!

Laŭ statistiko ekzistas sufiĉe da nutraĵoj por la tuta homaro, sed ankoraŭ multaj homoj suferas pro malsatego. Ili vivas kvazaŭ Makaro. La temo aspek-

tas malnova, sed ne. Ni devas sincere pensi kaj trakti ĝin.

Mi havis intereson pri la aŭtoro V. Korolenko (1853~1921). Tradukintino M. Ŝidloskaja skribis pri li jene en la libro: "El la malmulto dirita oni povas vidi, ke lia vivo estis bela, pri la belaĵoj de liaj verkoj parolu la verkoj mem. Ili estas multaj, pli ol 300, interalie multego da gazetaj artikoloj".


La rakonto estis tradukita en Esperanton, en 1926, sed la stilo estas ne arkaika!

Mi serĉis pli da informoj inter-rete. La verkisto estis ekzilata en Siberio (1881~85). Tiam li vidis mizeran vivon de tiutempaj jakutoj. Li certe akuzis maljustecon de la mondo per buŝo de Makaro. Kaj kelkaj el liaj verkoj estis tradukitaj en la japanan. Unu el ili estis tradukita per fama japana verkisto Mori Oogai (1862~1922). Li estis kuracisto kaj ankaŭ temis pri krimo de mizerulo en sia verko Takase-barko. Li skribis pri sinmortigo kaj eŭtanazio, sed ilia kaŭzo estis malriĉeco.

Mori Oogai studis medicinon en Germanio (1881 ~ 85). Du grandaj verkistoj, rusa kaj japana, vivis en sama tempo kaj frontis la samajn socialajn problemojn.


Tempo tute ŝanĝiĝis, sed min interesis, ke mortinto ricevas verdikton antaŭ Dio. Ĉar ankaŭ mi estis instruita, ke post sia morto ĉiu estos juĝata antaŭ Granda Reĝo de infero. Kaj niaj faradoj estas ĉiuj registritaj. ... Ne indas forgesi, ke plie multaj suferoj atendas malbonfarantojn.

"La Sonĝo de Makaro": Rudolf Mosse/ Berlin "Rakontoj de Oogai": Japana Esperanto-Instituto



Ni daŭrigas publikadon de gramatikaj lecionoj de J-L Tortel.

## Ĉiu-tag-e je la 20-a horo ni studu iom da Esperanto.



Saluton, gekomencantoj!

Ĉiu-tag-e je la 20-a horo ni studu iom da Esperanto.

(Tio ne estas proverbo, sed instigo al bona decido!)

Kial: **JE** ? Ĉar ne estas facile trovi taŭgan prepozicion (ni jam vidis en niaj babil-adoj 2a kaj 3a, ke prepozicio estas mal-longa vorto, kiu indikas la gramatikan rolon de la tuja posta fraza parto). Ali-dir-e prepozicio estas rol-vort-eto, kiel **PMEG** nomas ĝin. **PMEG**? Kio do tio estas? Paciencon, ni vidos tion poste. (Ni tuj rimarku, ke rolvorteto eble estas pli facile kompren-ebla kaj memor-ig-ebla por Azianoj, ol prepozicio (latine: antaŭ-loko) familiara nur al Eŭrop-lingv-anoj).

Malfacile ni povus trovi alian esprimon, ol je la... ekzakte ĉe la 20a, ĉe la preciza 20a horo, tuj komence de la 20a... Tiu rolvorteto do estas ia "jokero", tiu aparta karto, kiu en ludoj povas anstataŭi iun ajn alian. Geni-aĵo (ĝi ekzistas en nenia alia lingvo nun konata) de Zamenhof, kiu tut-inventis ĝin pro oportun-eco, kiel li klar-igas en sia fama *Letero al Borovko*, p. 421a, 8a linio, en Zamenhof, *Originala Verk-aro*.

Komence de Esperanto oni tre uzis ĝin; nun ĉiu-foje, kiam oni povas, oni preferas pli precizan rolvorteton, ekz. ĉe:

Preni infanon ĈE la mano (prefere al JE la mano), sed ne PER la mano: tio evidente signifus PER NIA mano.

"Je" restas tamen utile uzata en aferoj de tempo kaj de mezuro;

### Aferoj de tempo:

Ni aĉetos Esperanto-libron je la Zamenhof-festo.

(Kaj ne nur tiam: oni kalkulis, ke la mezaj Esperantistoj statistike aĉetas po unu libro en Esperanto dum unu... jar-cento! Ni ne imitu la "mezajn Esperantistojn" kaj super-u ilin).

Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi (3a frazo de la 29a Ekzerco de Fundamento de Esperanto).

### Aferoj de mezuro:

Vi certe estas je duono da kapo pli alta ol mi (Eliza Orzesko, *Marta*, 3a eldono, 1928, p. 174a, l. 4a; tradukis Zamenhof)

Abram estis tre riĉa je brutoj [...] (Genezo, 13, 2, tradukis Zamenhof)

La reĝo vetis kun li je ses berberaj ĉevaloj (Hamlet, 5, 2 tradukis Zamenhof). (Sen-riska fi-veto: la rapiro de Laerto estis kaŝe venenigita!).

Kiel klarigas Zamenhof mem en la Fundamenta 29a Ekzerco, tute dediĉ-ita al je: "Anstataŭ la vorto **JE** ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio.

Mi ridas je lia naiveco [...] aŭ

Mi ridas lian naivecon". Temas pri la jam vidita tre grava Esperanta regulo (babil-ado 3a): aŭ rolvorteto (prepozicio) antaŭ komplemento, aŭ -N ĉe la komplemento.

Kroma uzo, tute aparta, aperas antaŭ subita emocia krio, ofte sakro:

**Je Dio! Je la barbo de I! Profeto! Je la vosto de I! Diablo!**

Ĉiuj tiuj rimarkoj estas leg-eblaj en **PMEG (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko)**. Ĝi estas gramatiko pri Esperanto longtempe ekzist-inta (kaj ankoraŭ ekzist-anta) nur sur la Reto. Ĝia granda intereso kuŝas:

- en bonega maniero klarigi demandojn kelk-foje komplikajn per respondoj mir-ige simplaj;
- en tre oportuna prezent-ado laŭ formo de vort-aro, pere de litera indekso (ekz. nia hodiaŭa JE estas tuj tiel trov-ebla);
- en abundo da ekzemploj kun indiko de ties origino (kio ne trov-igas ali-loke, ekz. en PIV);
- en amaso da t. n. (tiel nomataj) lig-iloj, tio estas resendoj, per simpla premo sur vorto, al alia parto de la verko;
- en teksto elegante liter-um-ita kaj "aer-um-ita";
- en forlaso de ĉia "skolastika" gramatika koncepto (tamen kun konservo de rigora "zamenhof-eco");
- en sen-ĉesaj pli-bon-igoj laŭ la jar-pasoj (aperis pli ol 14 re-eldonoj, kun preciz-igoj kaj for-igoj de ne-evit-eblaj eraroj);
- en multaj aliaj bonoj mal-kovr-eblaj laŭ uzado.

Ĝi nun ankaŭ sur-papere aperis, kiel normala libro; ni uzu ĝin, rete aŭ libre: ni neniam bedaŭros nian faron. Ĝi ĝuas tre merititan sukceson, do ne-evit-eble vekis mal-pravajn kritikojn:

**Ju laboro pli publika, des pli granda la kritiko (783).**

*Adiaŭ! Ĝis la venonta fojo !*

*Johan-Luko*

Ĉar gasto de ĉi-numero de nia revuo estas tutmonde konata redaktoro Geza Kurucz, ni uzas la eblecon prezenti ĉi tie alian flankon de tiu kreema persono kaj proponas al vi interesan materialon de gramatikaj paĝoj de "Juna Amiko".

## Gramatikaj vortludoj el la revuo "Juna amiko"



### Konstruu vortojn!

ero > tero > utero > butero

Tiu ĉi simpla ludo deziras helpi al vi memorfiksi kelkajn novajn vortojn

#### Kiel ludi?

\* Elektu tre mallongan vorton kiel, ekzemple, *ano*, kaj poste aldonante al la komenco po unu literon, venu al novaj senco-havaj vortoj. Ĉi-okaze mi povis fari jenajn vortojn:

*lano, bano, kano, mano, hano, sano, pano, nano, rano, dano, ĉano, vano.*

Ĉiu el ili valoras **1** poenton (sume: 12)

\* La sekva paŝo estas pli malfacila. Provu aldoni al la supraj vortoj unu plusan literon por denove veni al nova vorto. Mi povis plu-formi nur ĉe tri vortoj:

*Elano, plano, Ivano, Irano, krano, brano*

Por ĉi tiuj vortoj ĉiu ricevas po **2** poentoj (sume: 12)

\* La daŭrigo estas la sama, sed ĉiu nova vorto nun valoras **4** poentojn. Mi sukcesis fari jenajn:

*divano, tirano, ekrano* (sume: 12)

\* Se vi povas pluri (mi ne povis), vi ricevos por unu vorto **8** poentojn.

Fine, ĉiu adicias siajn poentojn. Ĉi-foje mi akiris entute: 36 poentojn.

*Konsilo.* La ludantoj mem decidu, kiel longe konstrui vortojn. Mi proponas 5 minutojn. Krome, mi proponas al vi akcepti ŝanĝon de finaĵoj: *o, a, i, e* (kiel *vana* ĉi-supre).

Se vi permesas, mi rekomendas al vi kelkajn vortojn por ekiri:

*ero, ulo, ino, oro, ia, mi, ni, aŭ di, nu, aĝo, ono, alo, avo, iri, ilo, odo, ordo.*

Vorto-kreemon deziras: **Geza Kurucz**



### Ludu per Frazoj!

Prenu vorton (nepre verbon!). Por ekzemplo, mi elektas la vorton *timi* (mi rekomendas preni vorton, kies uzo diferencas de la gepatra lingvo-uzo). Petu iun konstrui, per ĝi, tre simplan frazon, kaj poste tuj demandi al kun-ludanto:

- *Mi timas.* > *Ĉu vi timas?*

La demandito respondu aldonante ion (nur unu vorton aŭ afikson) kaj tuj poste ankaŭ li/ŝi faru demandon al iu. Kaj la parolo tiel pasas de ludanto al ludanto. Ekzemple:

*Mi timas.*

*Ĉu vi timas?*

*Jes, mi timegas.*

*Ĉu vi timas, timetus aŭ timegas?*

*Mi apenaŭ timas.*

*Ĉu vi ofte timaĉas?*

*Mi neniam timaĉas.*

*Kiun vi timas?*

*Mi timas Andreon.*

*Ĉu ankaŭ vi timas lin?*


Kaj tiel plu. Estus bone ekzerci formojn: *timigi, ektimi, timinda, timi pri iu, (mal)timulo, (mal)timema.*

La demandoj povas vastiĝi al *kion, kial, kie, kiam* iu timas aŭ ne timas.

Ĉiu respondo kaj tuja simpla demando valoras po **unu** poenton. Surprizan al-donon de nova formo rekomencu per unu aŭ du plusaj poentoj. Pro gramatika eraro deprenu unu poenton. Se la ludo stumblas, helpe intervenu! Konformigu la ludon al viaj bezonoj.



# Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



**Neelpensita historio**  
Sergej Manzurov [Sibaj, Rusio]

## Kiel "fumi" en karbona dioksido?

Mi ne fariĝis kemiisto. Mi volis esti kemiisto post kiam, en la sesa klaso de nia lernejo, donis sian lecionon talenta instruisto de kemio Valentin Ivanoviĉ Teplov.

La altstatura grizhara instruisto metis sur sia tablo du glasojn da diafana likvaĵo kun vitraj tubetoj.

- Ĉu vi lernis ecojn de karbona dioksido? - demandis lernantojn Valentin Ivanoviĉ.

Ni lernis, - malvigle respondis miaj junaj samklasanoj.

Ecojn de karbona dioksido al ni rakontu Miĥail Batrakov!

"Batrak" (kromnomo de Miĥail en la klaso) leviĝis de lasta klasbenko kaj iris al instruista tablo.

Miĥail, mi delonge volas scii, ĉu vi fumas? - neatendite demandis lin la instruisto.


Mi ne fumas, - rapide respondis Batrak.

Bone. Tio estas kalka akvo, - kapsignis la instruisto al la glaso, - bonvolu blovi en ĝin tra la tubeto.

Batrak kliniĝis al tablo kaj forte blovis en la kalkan akvon. Ĝi tuj malheliĝis.

Kial la kalka akvo perdis sian travideblecon? - demandis instruisto.

Lernanto konfuzite rigardis la glason.



Ĵanatijeva Zuhra [Uralsk, Kazahio]

Miĥail, pensu, kion vi elspiris en la kalka akvo?

Valentin Ivanoviĉ, mi fumas, - subite agnoskis Batrak.

Nur pro tio la akvo malheliĝis?

- Jes.

Ĉu fumado estas agrabla okupo?

Fumado ne estas agrabla, pro ĝi mia kapo de tempo al tempo doloras.

"Pro fumado vi ne kapablas dece lerni", - konkludis la instruisto kaj, sendinte Batrakon reen al lia loko, daŭrigis lecionon:

Irina Lastoĉkina, mi petas vin blovi en duan glason.

"Lastoĉka", perfektulino kaj belulino de nia klaso, gracie ekprenis tubeton per lipoj kaj blovetis en la glason. Kalka akvo... malheliĝis.

Kial la akvo fariĝis malhela? demandis la instruisto.

Ĉar Lastoĉkina fumas! - kriis Batrak de lasta klasbenko. Tuj klasanoj ridegis.

Lastoĉka mirite respondis:

Mi ne komprenas, mi neniam fumis!

Sidiĝu, Irina, mi kredas al vi, - trankviligis sin Valentin Ivanoviĉ, kaj sin turnis al la klaso:

Aero, elspirata de homo, enhavas multe da karbona dioksido. Sub ĝia influo kalka akvo en niaj glasoj fariĝis malhela. Nur tiukaŭze. Sed ne ĉar Batrakov fumas aŭ Lastoĉkina ne fumas. Dum antaŭa leciono mi rakontis al vi ecojn de karbona dioksido. Sed ilin en via klaso neniu dece lernis, neniu scias!

Tiun lecionon mi fiksas en mia memoro por la tuta vivo. Mi fiksas en mia memoro ne nur ecojn de karbona dioksido. Dank'al la leciono mi komprenis - eblas interese prezenti eĉ tiom komplikan studobjekton, kiel kemio. Poste komprenis, ke ankaŭ fizikon, matematikon, materian rezistancon, logikon, filozofion... Poste praktike ĉiujn objektojn kaj homojn.

Mi ne fariĝis kemiisto. Mi fariĝis ĵurnalisto.

# Ŝercoj el la lerneja vivo

kolektis laŭ temo kaj esperantigis N.Saldin [Jekaterinburg, Rusio]

## Sencerbe

Lekcio estas procedo de transiro de surskribaĵoj el la notlibro de instruisto al la kajero de studento sen traŭro tra ies cerbo.

\*

## Elturniĝis

Ĉe la studento finiĝis mono, restis nur kelkaj moneroj por telegramo por unu vorto. Li sendis al la gepatroj telegramon: "Kvincentrubligu"!

\*

## Kiu devas scii

— Kion devas scii studento?  
— Ĉion!  
— Kaj kion devas scii laboratorist? (Laboranto)?  
— Preskaŭ la samo, kiel studento.  
— Kaj aspiranto?  
— En kiu libro troviĝas tio, kion devas scii studento.  
— Docento?  
— Kie kuŝas tiu ĉi libro.  
— Profesor?  
— Kie troviĝas la docento.

\*

## Kion fari?

Staras knabo kaj rigardas en fenestron. Subite li ŝanĝiĝas vizaĝe, kuras al la patrino kaj krias:  
— Panjo, panjo, tie la patro iras! Kion ni montris al li la unua – mian poentlibron aŭ vian novan robon?

\*

## Stranga afero

— Sinjoro profesoro, vi havas unu brunan kaj unu nigran ŝuojn sur viaj piedoj.  
— Jes, ĉu ne estas trange, ke mi hejme havas egalan paron?

\*

## Kie oni instruas al nesciado

— Aŭskultu, junulo mia, - diris la profesoro, - ĉu mi rajtas demandi vin, en kiu lernejo vi akiris ĉi tiun maloftan mankon de sciado?

## Vespera preĝo

Stefan, 6-jara, vesperpreĝas:  
— Bona Dio, lasu min iĝi bonkondata kaj brava knabo, sed se tio ne eblos, tiam donu al panjo iom pli bonajn nervojn.

\*

## Maljuste

— Panjo, ĉu estas vere, ke la instruistino en la lernejo ricevas salajron?  
— Jes, certe, knabineto.  
— Kiel maljuste. Ŝi nun demandas nin, sed ni, kiuj devas scii la respondojn, ricevas nenion.

\*

## La eta diplomato

Filo: — Patro, en ĉi tiu jaro vi havos grandan profiton.  
Patro: — Kiel?  
Filo: — Por la venonta lerneja jaro vi ne bezonos aĉeti al mi novajn lernolibrojn.

\*

## En la lernejo

Instruisto rakontas pri kuraĝo kaj forto de leono.  
— Ĉu vi nun povas nomi beston, kiun la leono timas?  
Unu al la knabaro fervore signalas per la mano.  
— Nu, ni aŭskultu.  
— La leoninon.

## Necesas helpi al la paĉjo

Juna knabino telefonparolas kun amikino:  
— Ne, nun mi ne havas tempon plu babili. Mi devas iri al paĉjo por helpi lin pri miaj lernotaskoj.

\*


## La vera nomo

— Kiu estas la nomo de via patro?  
— demandis instruistino al knabineto.  
— Mi ne scias, - estis la respondo.  
— Nu, ĉu vi eble scias, per kiu nomo via patrino nomas lin?  
— Vi, maljuna azeno.

\*

## El la biblio

Instruistino foje rakontis, ke Dio kreis ĉion, kaj ke la homo estas la plej altranga kreaĵo. Ŝi volis scii, ĉu la infanoj komprenis la instruadon, kaj demandis:  
— Kio estas la plej alta, kion Dio kreis?  
Knabeto svingis la manon.  
— Nu, Pier!  
— La arboj.  
— Jes, jes, ja! La demando estis eble iom erarformulita! Sed Adamo kaj Evo do, kion vi diros pri ili?  
— Ili estis paro de pomoŝtelistoj... Post tiu ĉi respondo estis neeble krei pian etoson en la klaso.



Aleksandr Osincev [Jekaterinburg, Rusio]

## Profesiîgu en Esperanto-instruado per "Flugiloj de malfacila vento"

Estante esperantisto vi ĝuas diversajn erojn, kiuj konsistigas nian E-kulturon kaj E-movadon. Ĉu tio estas internacia amikeco, vojaĝoj aŭ multspeca socia aktivado pere de Esperanto – tio dependas nur de via gusto kaj interesoj. Tute nature aperas ĉe vi deziro dividi tiujn eblecojn kun viaj neesperantistaj amikoj, samlernejanoj kaj aliaj junaj kolegoj. Plej evidenta maniero realigi tion estas inviti homojn al kurso de la internacia lingvo. Tamen se tia kurso forestas, ĉiam vi povas iĝi instruisto kaj lanĉi la kurson memstare.

Tio, certe, ne estos facile. Necesas elekti instrumetodon, skribi studplanon, prepari konvenajn instrumaterialojn. Krome, vi mem devas verŝajne havi tre altan lingvonivelon kaj senti vin certa kaj klera dum ĉiu leciono. Ankaŭ utilos por vi scii, kiel konduki en diversaj instrusituacioj. Tiujn sciojn kaj trajtojn oni akiras kun sperto. Sed kion fari nun, kiam vi estas juna kaj ankoraŭ ne havas sperton? Por tiuj, junaj kaj ne tre spertaj estis lanĉita seminario "Flugiloj de malfacila vento".

"Flugiloj" bonvenigas junajn instruemulojn, kiuj havas fortan deziron lanĉi kurson de Esperanto, sed bezonas profundigi siajn teoriajn sciojn pri instruado kaj ricevi praktikajn konsilojn pri ĝi. La seminario estas komuna projekto de TEJO, ILEI kaj E@I. Ĝi okazis jam dufoje: dum IJK en Kovrov (Rusio) kaj dum IJK en Zakopane (Pollando).

Du grandaj partoj de "Flugiloj" estas "Metodiko de Esperanto-instruado" kaj "Gramatiko". Dum metodika parto vi lernas kiel instrui, konatiĝas kun ĝeneralaj metodoj de lingvoinstruado kaj specifaj esperantistaj aliroj. Kaj la gramatika celas altigi la lingvonivelon dum ĝi. Plej tiklaj gramatikaĵoj estas preparolataj, same kiel bazaj aferoj. Speciale por "Flugiloj" estis eldonita "Manlibro pri Esperanto-instruado", por kio laboris Katalin Kovats.

Antaŭ la seminario partoprenantoj ricevas materialojn, kiuj helpas al ili prepari provlecionon kaj skribi sian unuan studplanon. Dum seminario ili havas ŝancon provludi kaj montras sian lecionon, post kiu ili ricevos konsilojn de pli spertaj kolegoj kaj gvidantoj.


Dum la lastaj jaroj la seminario iĝis tre populara kaj multaj homoj ŝatus aliĝi. Ĉefaj kriterioj de elekto de partoprenantoj estas pedagogia klero kaj bona lingvonivelo (atestiloj pri sukcesa paso de diversaj E-ekzamenoj valoras!). Sed la plej grava estas via deziro instrui Esperanton.

Por gvidantoj de la projekto estas lanĉita alia seminario "Gvidu la Flugilojn", dum kiu spertaj instruistoj transdonas sperton al junaj Esperantistoj-instruistoj, por ili poste gvidu la seminarion "Flugiloj de malfacila vento". Ĉi-jare ĝi okazis dum Ago-Semajno en Pollando.

Estis rekomendita okazigi la seminarion dum amasaj E-aranĝoj: EEK (junulara programo), IJK, IJS (Hungario), IS (Germanio), IJF (Italio), SEJT (Rusio).

En la jaro 2007 "Flugiloj" okazos dum Konferenco de Eŭropa Esperanto-Unio en Maribor (Slovenio).

Spertiĝu dum lernado por esti certa dum instruado! Ne hezitu montri vian motivecon, ĉar ĝi helpas eniri la seminarion kaj profesiîgi en Esperanto-instruado dum "Flugiloj de malfacila vento"!



*Flugiloj de malfacila vento*  
Maribor, Slovenio 27.07-04.08 2007

La trejnseminario "Flugiloj de Malfacila Vento", invitas ĉiujn junajn instruantojn kaj instruemulojn de Esperanto!

La trejnseminario estas aranĝo de ILEI, TEJO, E@I kaj LKK de EEK.

La trejnseminario okazos enkadre de Eŭropa Esperanta Kongreso (EEK-7) en la urbo Maribor (Slovenio) kaj pasos la 27.07-04.08 2007, enkadre de la junulara programo.

La trejnseminario (6 studunuoj po 2 horoj) konsistos el 2 temaj partoj: la metodika kaj la gramatika. La metodika parto enhavos la sekvajn teoriajn temojn: instrumetodoj; bazaj principoj de instruado; planado de leciono; lerniloj. Dum la praktika parto bezonatos prezenti instruadon de lecion-fragmento. En la gramatika parto estos traktataj - teorie kaj praktike - malfacilaĵoj de la Esperanta gramatiko.

Por aliĝi al la trejnseminario necesas ĝis la 20-a de majo plenigi la Demandaron (vidu sube) kaj ĝis la 1-a de junio prepari la planon de la 15-minuta lecion-fragmento (vi ricevos la rekomendojn pri "kiel fari tion").

Se dum la studado vi montros teoriajn sciojn pri iuj metodikaj temoj, sukcesos pri la gramatika kontrolo kaj prezentos lecionfragmenton, vi ricevos la oficialan Ateston de ILEI pri la partopreno en la trejnseminario.

La partopreno estas senpaga, sed vi estos petataj pagi ILEI-kotizon por la kuranta jaro.

Ĉiuj kurantaj informoj estas haveblaj ĉi tie: <http://moskvo.ru/masi/>

Bonvenon!


Jubilea Internacia Ekspozicio

# Samarkando

## en Ĉiuj Kontinentoj

En aŭgusto 2007 urbo Samarkando oficiale kaj solene festos sian 2750-jariĝon subaŭspicie de UNESKO. Por celebri la gloran jubileon de la mondfama urbo, la **Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro** kaj loka E-klubo kolektas diversspecajn kaj ĉiulingvajn materialojn (gratulleterojn, vojaĝrakontojn, gazetartikolojn, librojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, citaĵojn, fotojn, desegnaĵojn, dokumentojn ktp) pri Samarkando kaj samarkandanoj. Fakte, ĉio ajn pri la temo, inkluzive fotojn kaj/ aŭ informojn pri la hoteloj, restoracioj, vendejoj, stratoj, komunumoj, firmaoj, varoj, librotitoloj, artaĵoj ktp portantaj la nomon "Samarkand" aŭ simile, estos TRE bonvena.

Ĉiuj ricevitaj kontribuajoj estos agnoskitaj kaj eksponataj en la internacia ekspozicio en Samarkanda Ŝtata Muzeo pri Historio de Kulturo kaj Artoj de Uzbekistano



Anticipajn dankojn por via kunlaboro kaj afabla subteno. Bonvolu adresi viajn kontribuojn laŭeble baldaŭ al: **Anatoli Ionesov**, la Direktoro de Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, P.O. Box 76, UZ - 140100 Samarkand Respubliko Uzbekistano

## Enigmo 2007

### Horizonte

- B- Reĝa birdo.  
 B- Blua krustaco.  
 C- Litero.  
 C- Akva besto.  
 Ĉ- Igas lakton.  
 Ĉ- Malhela ĉe Andersen.  
 D- Deveno de homo.  
 D- "Similas" homon.  
 E- Akvoĉevalo.  
 F- Prepozicio de movo.  
 G- Reĝo de la bestoj.  
 Ĝ- Fosisto kun malalta malantaŭo.  
 Ĝ- Serpento griza aŭ verda kun piedoj.  
 H- Plej peza norda remaĉulo.  
 Ĥ- Blanka, nigra, griza... mamulo.  
 I- Sovaĝa koko.  
 I- Kiuj fajfas super viaj kapoj.  
 Ĵ- Homamema marmamulo.  
 Ĵ- Longkola besto.  
 K- Akvoĝonglisto.  
 L- Reĝo de niaj arbaroj.  
 M- Ruza kiel...  
 N- Noktbirdo.  
 O- Plej peza marmamulo.  
 P- Kruelega marmamulo.  
 R- La plej bela konkerajo de la homo.  
 R- Longkrura birdo.  
 S- Birdo kiu ne plu scias flugi.

### Vertikale


- 1- Iom dika, granda muso.  
 2- Granda simio.  
 3- Mara pinĉulo.  
 3- Unuĝiba mamulo (dezerta ŝipo).  
 4- Nordamerika bovo.  
 5- *Beaudelaire* ege amas ĝin. Musa orgo.  
 5- Duĝiba mamulo.  
 6- Havas domon sur dorso.  
 6- Saltas bone kaj bele proksime de la en laĝeto.  
 7- Belega flugulo.  
 8- Ŝajnas esti helpanto de avofrosto.  
 9- Post azeno kaj bovo, kliniĝas antaŭ la bebo.  
 10- Pezega mamulo.  
 12- Manĝanto de aveloj.  
 13- Kurbirdo.  
 14- Eta, blanka aŭ griza, ne ŝatata de virinoj.  
 14- Sovaĝa eŭropa porko.  
 14- Frapanta birdo.  
 15- Malsovaĝigita lupino.  
 16- Kun unu aŭ du kornoj sur la nazo.  
 16- Nokta rabobirdo.  
 18- Kun antaŭa poŝo.  
 18- Kanada helpisto pri akvobaraĵo.

## Bestoj 20 poentoj

nur radikoj escepte de "o"j jam figuritaj

kompilis

**Johana Schertzer-Hervy**  
 [La Meauffe, Francio]



## Anoncetoj

## Informoj

## Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 60-jara bonnivela esperantistino el Rumanio. Mi amas literaturon, artojn, naturon kaj sincerajn homojn. Mi deziras korespondi kun samaĝa rusino nur paperpoŝte.

s-ino *Lenke SZASZ*

537240 PRAID

Str. principala № 130, Jud. Harghita

**Rumanio**

Mi estas studentino, meznivela esp-istino. Mia nomo estas Vada, kaj mi ŝatas havi novajn geamikojn, mi ankaŭ ŝatas dombestojn speciale ĉevalojn. Mi ŝatas filmojn, librojn, kaj ŝanĝi retmesaĝojn kun esperantistoj.

*Vada Stuart Fiuk*

Kentucky. **Usono**

verdavada@yahoo.it

Mi estas 58 jara virino, komencanta esperantisto. Mi parolas anglan kaj francan lingvojn. Intereso: naturo, politiko, poŝtkartoj, lingvoj, arto, teatro, vojaĝoj.

*Olga Beljaeva*

St-Peterburgo, **Rusio**

olabel21@bk.ru

Serĉu

korespondamikojn ĉe  
[www.Edukado.net](http://www.Edukado.net)

5 knabinoj-komencantinoj (13-14 jaraj) Katja, Nadja, Sveta, Sevinĝ, Rita deziras korespondi tutmonde!!! Ni estas gajaj, vivĝoj, belaj. Intereso estas diversaj: pentrado, lingvoj, muziko, dancoj, komputilaj ludoj.... Skribu al:

*Esperanto-rondeto*

Balakireva 41

(ŝkola № 2),

Vladimir,

600028

**Rusio**

sch2\_vl\_esp@mail.ru

Mi estas Gergo, mi studas ekonomion. Mi tre bone parolas la anglan kaj ekplaĉis al mi ankaŭ Esperanto. Por pli-bonigi miajn konojn pri Esperanto, mi ŝatus korespondi kaj ekkoni kiel eble plej multajn homojn el diversaj kontinentoj. Ĉefe interesas min Afrikaj kulturoj. **Int:** Afrikaj kulturoj, filmoj, vojaĝo, sporto, muziko

s-ro *Gergely Kauker*

Budapeŝto

**Hungario**

kauker\_gergo@tvn.hu



Koresponda Servo de JEI

Se vi volas korespondi kun japano(in)oj, turnu vin kun konciza prezento al Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto: Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokyo-to, 162-0042, **Japanio**  
[jei@mre.biglobe.ne.jp](mailto:jei@mre.biglobe.ne.jp)

Mi loĝas en la urbo, kie estas aktiva E-klubo, kies aktiva ano mi estas. Mi estas edukistino, progresanta esperantistino. Mi serĉas homojn, kiuj okupiĝas pri edukado de etuloj 1-7 jaraj. Mi volas interŝanĝi sperton, metodikojn. Ankaŭ reciprokaj vizitoj ĉi-cele estus bonvenaj. Sed temas ne nur pri la E-edukado. **Int:** esperanto, ludoj por etuloj

s-ino *Anjela Belenko*

Jalta

**Ukrainujo**

jonatana05@ngs.ru

Mi estas 27-jara komencanto. Mi serĉas korespondamikojn el diversaj landoj. Mi partoprenos UK en Jokohamo.

s-ro Hayashi Ken

Tokio, Japanio

giorgi@hotmail.co.jp

Mi estas flegistino, progresanta esp-te. Mi volonte inteŝanĝu kun iu tradukadojn - temo libera, longeco de la tekstoj pridiskutebla. Krom tio mi povas korespondi pri aliaj temoj - literaturo, vojaĝoj, kutimoj, nuntempaj mondokazintaĵoj, ekologio. **Int:** tradukado, biciklado, literaturo

s-ino Dorota Burchardt

Piłsudskiego 13/3, PL-19-300, Etĥ

**Pollando**

dorburc@interia.pl

Mi estas 41-jara komencanto, patentologo, programisto. Mi ŝatas krei problemojn kaj solvi ilin, membras en "Asocio de teorio por decidi taskojn de inventistoj". **Int:** lingvistiko kaj ĉio alio. Respondo garantiata.

Aleksandr Grebenkin

Kirov,

**Rusio**

gavric6@rambler.ru

Mi estas viro 71 jara, meza nivelo pri Esperanto. Mi estas edziĝinta, mi havas 2 gefilojn kaj 5 genepojn. Nun emerita, mi estis psikiatra flegisto, mia edzino estis instruistino por plej junaj infanoj, direktorino de lernejo. Mi loĝas en Brive, urbo de 55 000 loĝantoj, sudo-occidente de Francio.

s-ro *Conche Guy*

Brive,

**Francio**

guy.conche@wanadoo.fr

**komencanto@r66.ru**

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

